

---

## 何を感謝するのか

### *Pro kia danki*

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

---

「朝に礼拝 夕に感謝」という言葉があります。日々のあくせくした暮らしの中で、せめて1日に2回（起きた時と寝る前、あるいは出勤前と帰宅後）はお内仏に向き合って、礼拝と感謝を捧げましょう、という呼びかけです。

ここで、感謝ということについて考えてみましょう。

よく、「こんな恵まれた暮らしをさせていただいているのも、ご先祖様のおかげだから、感謝せんとバチがあたるで...」とおっしゃる方がいます。「恵まれた暮らし」というのがどの程度のものかはともかくとして、年輩の方の感覚としては「昔は食べるにも事欠いた、今はぜいたくさえ言わなければ食べていくことはできるのだからありがたい」ということのようにです。

私はこういう言い方を耳にすると、内心で違和感を感じてしまいます。それというのも、「世界では毎日2万4千人が餓死し、8億人の生命が飢餓にさらされ、そのうち3億人は児童だ」という国連のアナン前事務総長の演説が記憶に新しいからです。この事実の前では、「自分は飢餓には無縁だからありがたい」という感覚は、いかにも思いやりに欠けた傲慢さの表れでしかありません。

Oni ofte uzas la esprimon: "matene adori, vesperi danki." Tio estas la alvoko, ke ni adoru kaj danku sidante antaŭ budha altaro almenaŭ du fojojn en unu tago, post ellitiĝo kaj antaŭ enlitiĝo, aŭ antaŭ foriro de hejmo kaj post reveno al hejmo.

Nun ni pripensu pri danko.

Ne malmultaj ofte diras, "Dank' al niaj prapatroj ni pasigas ĉi tiel favoratan vivon. Se ni ne dankas al ili, ni estos punitaj..." Ne temas pri tio, ĝis kioma grado ilia vivo estas favorata. Ĉiukaze maljunuloj havas la senton: antaŭe al ili mankis eĉ manĝaĵo, sed nun ili povas almenaŭ manĝi ion, se ne frandaĵon, do tio estas tre dankinda.

Mi mem aŭdante ĉi tiun dirmanieron sentas ion malagrablan en mia koro, ĉar mi ankoraŭ nun memoras la paroladon de Kofi Annan, la eksa Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj; li diris, "En la mondo 24,000 homoj ĉiutage mortas pro malsato. 800 milionoj da homoj suferas pro malsato, inter kiuj 300 milionoj estas infanoj." Se ni sentas, "Estas dankinde, ke ni jam ne riskas suferi pro malsato", tio estas elmonro de senkompata orgojlo, sub tiu ĉi fakto.

宮沢賢治は『農民芸術概論綱要』冒頭で、「世界がぜんたい幸福にならないうちは個人の幸福はあり得ない」と述べています。飢餓に無縁であることは、少なくとも現時点においては、真の幸福ではなく、自己満足に過ぎないのでしょう。

江戸時代に、幕府は「上見て暮らすな、下見て暮らせ」という道徳を人々に押し付けました。今でもこれが美德だと信じている人がいるようです。しかし、これは身分制や現実の差別に不満を抱かせないための封建主義道徳に他なりません。一方に贅沢三昧に暮らす人々があり、一方に飢餓で死ぬ人々がいる、その現実の中で、我が身一人が「恵まれた暮らし」にあることを喜ぶありさまは何と非人間的でしょうか。

「健康で暮らせることが何よりもありがたい」という感覚にも、私は「そうだろうか？」と疑問を感じます。世の中には、難病に苦しんでいる人がたくさんいます。それに、病気はいつ襲ってくるか分かりません。「健康でいられることに感謝」している人は、病気になったとたん、「何でこんな体になってしまったの」と、悲嘆をかこつにちがいません。ふだん、「ご先祖様のおかげ」を口にしてしている人は、ここで「ご先祖様の祟り」のせいにするのでしょうか。感謝されたり怨まれたりでは、ご先祖様こそいい迷惑でしょう。

健康で長生きを願うのは、人間である以上あたりまえのことではありますが、それはいつかは「儂（はかな）い

Miyazawa Kenzi diris en sia verko "Skiza Enkonduko al Kamparana Arto": Dum la tuta mondo ne estas feliĉa, ne povas esti individua feliĉo. Resti fremda al malsato ne estas la vera feliĉo sed estas nur memkontento.

En la epoko Edo ŝoguna registaro altrudis al la popolo la moralon, ke oni vivu vidante ne homojn pli favoratajn sed tiujn malpli favoratajn. Ankoraŭ nuntempe troviĝas iuj, kiuj kredas ke ĝi estas virto. Sed ĝi ne estas alia ol feŭdalisma moralo, kiu utilas por ke la popolo ne sentu malkontenton kontraŭ klasa sistemo kaj efektiva diskriminacio. Sur unu flanko troviĝas homoj vivantaj luksege kaj sur la alia flanko troviĝas homoj mortintaj aŭ mortontaj pro malsato. Kiel malhomarane estas ĝoji pro sia favorata vivo tute individua en tiu ĉi realo!

Pri la sento, ke sana vivo estas la plej dankinda, mi havas dubon. En la mondo estas multaj homoj suferantaj pro malfacila malsano. Cetere malsano povas ataki nin ĉiam ajn. Tiuj, kiuj "dankas pro sia sanstato", plendos, "kial mia korpo fariĝis ĉi tia...", kiam ili fariĝos malsanaj. Ĉu ili ĝis nun dankinte siajn prapatrojn pro sia sano nun atrubuas sian malsanon al malbena de siaj prapatroj? Prapatroj estante dankataj kaj riproĉataj certe estas en embaraso.

Kompreneble homoj ĉiam deziras

夢」であったことが知られてくるに違いありません。感謝を捧げる意味は、物欲が満たされたことへのお礼であってはならないのはもちろん、我が身一人の見かけの幸福に浸ることであってはなりません。

源信（天台宗の学僧）は『横川法語』で次のように書いておられます。

「それ、一切衆生、三悪道をのがれて、人間に生まるる事、大なるよろこびなり。（中略）世のすみうきはいとうたよりなり。人かずならぬ身のいやしきは、菩提をねがうしるべなり。このゆえに、人間に生まるる事をよろこぶべし。」

人間に生まれたからこそ、「儂さ」をのりこえて真の幸福（菩提）を求めることができる、それは大いなる喜びである、と源信は言っているのです。人間として今・此処にあること、そのことにまず感謝を捧げるのが筋ではありませんまいか。

sanon kaj longvivon; tamen evidentiĝos, ke tiu deziro estas efemera revo. La dankofero ne devas esti direktata al memkontentiga satiĝo de deziroj nek al memkontentiĝo en surfaca feliĉo de si sola.

Gensin, budhologa bikŝuo de la skolo Tjantai diris ĉi tiel:

"Nu, vi ĉiuj, estas granda ĝojo, ke vi naskiĝis kiel homoj fuĝinte el la tri malbonaj suferoj (...) Tio, ke tiu ĉi mondo estas plena de malfacilaĵoj, faras kondiĉon por malŝati tiun ĉi mondon. Tio, ke vi havas aĉan vivkondiĉon, faras vojmontrilon por deziri bodion. Tial vi devas ĝoji pro esti naskiĝinta kiel homo."

Ĝuste ĉar ni naskiĝis kiel homoj, ni povas serĉi la veran feliĉon, t.e. bodion trans efemeraĵojn; tio estas granda ĝojo. Jen ĉi tiel Gensin diras. Ni devas unuavice oferi dankon al tio, ke ni estas nun ĉi tie kiel homo.